„Mutig vorwärts!“ „Kuraĝe antaŭen!“

Aŭstria Esperantisto
(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Aŭstria Esperanto-Asocio

6a jaro. N-o. 10 Monata Oktobro 1929

Redaktejo kaj administrejo: Korneuburg ĉe Wien, Postfach.

Konto bei der Postsparkasse D-123.826 u. 36.783 (Sparkasse Korneuburg).

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ. S 4.80, germanlandanoj RM 3.25 alilandanoj sv. fr. 4.25, ponumere: por enlandanoj 45 aŭ. g., eksterl. 55 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Dr. Ludwig Zamenhofstraße.

Die von der Rauchgasse zur Wilhelmstraße führende Verbindungsstraße wurde nach dem Erdenker des Esperanto benannt.

Der Volkskommissär für das Postwesen der russischen Sovjetrepubliken hat zwei neue Briefmarken mit Esperantotext zur Ausgabe gebracht.

Parlamentswahlen und Esperanto.

Während der Parlamtswahlen in Queensland (Australien) versandte die Esperanto-Gesellschaft in Brisbane Rundschreiben an die Kandidaten, um ihre Einstellung zu folgenden Fragen zu erfahren: 1. Verwendung des Esperanto bei den Regierungsämtern, die in Verbindung mit dem Auslande sind; 2. Unterricht des Esperanto in allen Regierungsschulen. Von den 16 Kanditaten sprachen sich für 1., bezw. 2. 13, bezw. 12 aus, von denen 6 (5 Regierungspartei, 1 Arbeiter) gewählt wurden.

Das schwedische Parlament bewilligte über Antrag des sozialdemokratischen Abgeordneten Eriksson in gemeinsamer Abstimmung beider Kammern 3900 Kronen für Esperantokurse für die Lehrerschaft.

Das japanische Parlament hat beschlossen, Esperanto in die unteren und mittleren Schulen einzuführen und dem Japanischen Esperanto-Institut eine Subvention zu geben.

Die Postdirektion in Nagasaki (Japan) veranstaltet einen Esperantokurs, an dem 128 Beamte teilnehmen.

Ein Ferienaustausch der Esperanto sprechenden Schuljugend wurde von den Esperantoorganisationen in Estland und Schweden mit Erfolg veranstaltet.

Radio Odessa, dessen Stärke jetzt auf 10 kw. erhöht wurde, beabsichtigt, Esperanto-Konzerte, -Berichte, -Kurse usw. zu senden.

Radiostation Turin (ITO, 7 Kw, Wellenlänge 275,2) hat am 21. August 21.30 h, 10 Min. in Esperanto gesendet und setzt jeden Mittwoch diese Sendungen fort. Hörer wollen an die Direktion des E. I. A. R. Radio-Turin guten Empfang melden. Hoffentlich werden auch andere Stationen in Italien folgen.

Pädagogisches Institut in Darmstadt hat über Weisung des Hessischen Ministeriums für Kultus und Volksaufklärung einen Esperantokurs eingerichtet, Kursleiter Herr Pfaff, Worms.

Bildungsstelle des Volksbundes der Katholiken Oesterreichs, Wien, VIII. Piaristengasse 43, hat in ihr Kursprogramm für das Wintersemester 1929/30 wieder Esperanto (Lehrer Gustav Weber) aufgenommen. Mittwoch ab 6—½8 Uhr für Anfänger, 8—9 Uhr für Fortgeschrittene.

Der Völkerbund - La Société des Nations, das Organ der Schweizer Gesellschaft für den Völkerbund (Juli/August 1929) bringt eine sehr günstige Besprechung des Buches „Esperanto ein Kulturfaktor?“, die mit folgendem Satze endet „Im Interesse des Friedenss und des Völkerbundes der Herzen ist dieses Buch begrüßenswert und der größten Verbreitung würdig.“

Die Zeitschrift **„Der Beamtenbund“** — Saarbrücken — bringt in No. 36 einen längeren Aufsatz über „Paneuropa und die Sprachenfrage“ in welchem der Verfasser (K. Schneider) Esperanto als die einzige Lösung der paneuropäischen Sprachenfrage hinstellt.

Esperanto-Gottesdienst mit Predigt
Wien, I. Minoritenkirche
Sonntag, den 20 Oktober 1929, 10 Uhr vm.

Der Bundeskanzler Wien 24. 9. 1929.
An den
Verein »Internationales Esperanto-Museum«
(zu Handen des Präsidenten Herrn
Regierungsrates Hugo Steiner)
Wien, I.

Anverwandt beehre ich mich zur Förderung des Internationalen Esperanto-Museums in Wien den Betrag von 200 Schilling zu übermitteln.

Mit dem Ausdruck der vorzüglichsten Hochachtung Streeruwitz, e. h.

Karl Seitz — 60 jara,

S-ro Karl Seitz, landestro kaj urbestro de Wien, kiu eniris kiel membro en »Internacian Honoran Komitaton« de »Internacia Esperanto-Muzeo en Wien«, fariĝis 60-jara.

Decas, ke ni per kelkaj frazoj skizu la vivovojon de ĉi tiu eminentulo, grava por nia movado: Naskita la 4. septembro 1869 en Wien, li perdis baldaŭ siajn gepatrojn kaj estis edukata en orfejo. Li studis en instruista seminario, fariĝis popolinstruisto. Liaj filozofaj kaj ekonomiaj studoj lin kondukis al socialismo. Li organizis la »junulojn« kaj baldaŭ lia nomo estis konata. En 1900 li estis elektata deputito en la regna parlamento kaj 1901 kiel socialdemokrato en la landa parlamento. Li fariĝis vicprezidanto de la parlamento. Post la renversiĝo la parlamentano Seitz fariĝis kune kun Hauser kaj Dinghofer samrajta prezidanto de Nacia Deputitaro kaj oni konfidis al li laŭ la konstitucio de marto 1919 la funkcion de ŝtatestro. Post 1920 la socialdemokratoj denove estis en la opozicio kaj Seitz denove transprenis la gvidadon de la partio. En la Nacia Deputitaro li fariĝis dua prezidanto. En aŭtuno 1923 post la morto de la unua socialdemokrata urbestro de Wien Jakob Reumann, Karl Seitz estis elektata urbestro de Wien.

Tiel la jubilanto atingis el plej granda mizero la plej altrangan pozicion, kiun la urbo povas disponigi.

Sed ankaŭ por Esperanto la urbestro multon faris; antaŭ kelkaj tagoj la gazetoj anoncis, ke la komunumo nomis novan straton en Wien laŭ la elpensinto de Esperanto »D-ro Zamenhof-strasse«.

Por »Intern. Esperanto-Muzeo en Wien«
Steiner, prezidanto.

Dr. Ludwig Zamenhofstrasse.
La komunumo Wien nomis la straton inter Rauchgasse kaj Wilhelmstraße en la 12. distrikto laŭ la aŭtoro de Esperanto.

Sub la titolo »1-a Universala Kongreso de Esperanto Budapest 1929« aperis en la oficiala organo de UEA »Esperanto« n-ro 349 (sept. 1929)« Babilado de amatora fuŝisto«, en kiu la aŭtoro babilas ankaŭ pri la aranĝoj en Wien. Nek estas nia tasko, nek intenco taksi ĉi tiun gazetartikolon pri ĝia ĝenerala literatura valoro. Faru tion ĝiaj legantoj mem. Ni volas nur protesti kontraŭ la sentakta maniero, per kiu la babilemulo pritraktas la plej seriozan kaj plej dignan okazintaĵon de la festaranĝoj en Wien, en la kvina parto de sia pro trospritemo fuŝa babilado.

Post ĉi tiuj spertoj ni povas nur sincere bedaŭri, ke li estis »escepte« (vere nur escepte) invitita al tiu solena manifestacio.

Komitato de Antaŭkongreso-Wien.

Eĥoj.

Kun granda ĝojo ni povas raporti, ke la aranĝoj en Wien kontentigis la tutan ĉeestantaron.

Tio montriĝis en la bonegaj kritikoj en la diverslanda E.-gazetaro, el kiuj ni nur citas kelkajn:

»Heroldo« — »Brila Antaŭkongreso en Wien«, »La Antaŭkongreso en Wien estis unika sukceso. Neniam ĝis nun ni travivis ion tian en nia movado, ke la Prezidanto de la Ŝtato mem ne nur diras kelkajn afablajn vortojn al la kongresanoj (eĉ tion ni ne spertis ĝis nun) sed ke li eĉ, kial okazis ĉe la inaŭguro de la Esperanto-Muzeo, kvazaŭ mem transprenas la aferon en siajn manojn farante propagandan paroladon kian ni ne povas atendi en pli efika formo de nia plej agema propagandisto. La Antaŭkongreso estas unu el la plej gravaj markiloj sur la vojo al nia fina

celo kaj triumfo. La neesperitan sukceson oni dankas al la multjara fervora agado de la Vienaj samideanoj, precipe de s-ano Hugo Steiner, kaj kiel plian oficialan rekonon de Esperanto oni povas noti, ke s-ro Steiner ĝuste pro siaj aboroj por Esperanto estis honorata de sia registaro per la titolo ‚registara konsilanto'.« »La sukceso de Antaŭkongreso estas eĉ pli granda ol mi imagis unue. Intertempe ni sciiĝis, ke la akcepton ĉe ŝtatprezidanto Miklas ĉeestis ankaŭ kanceliero Streeruwitz kaj la direktoro de la prezidanta kancelario s-ro Klastersky . . . . . . »Estas neeble citi ĉiujn romojn — mallonge, neniam ĝis nun E. trovis tian atenton ĉe oficialaj rondoj kian ĝi ĵus spertis en Vieno okaze de la malfermo de Int. Esp.-Muzeo.« —

»**Germana Esperantisto**«: »An den belebteren Straßenkreuzungen, an den Brennpunkten des Verkehres, vor den Versammlungslokalen usw waren esperantokundige Polizeibeamte, weithin kenntlich durch das leuchtende Schild »Esperanto« mit grünem Stern aufgesetzt Stets hilfsbereit gaben sie Auskunft. Man hatte den Eindruck, als sprächen in Wien alle Polizeibeamten Esperanto. Der Wiener Polizeidirektion gebührt aufrichtiger Dank für diese weitblickende Vorsorge im Dienste des Fremdenverkehrs.« — »Offizeller Empfang beim Bundespräsidenten Miklas! . . . Pünktlich um 10 Uhr erschienen Bundespräsident Miklas und Bundeskanzler Streeruwitz, begleitet von Direktor Klastersky vom Büro des Präsidenten . . . Bundepräsident und -kanzler reichten jedem die Hand und erkundigten sich über die Stellung der einzelnen Personen in der Bewegung.« — »Im herrlichen Festsaale des Rathauses empfingen Stadtrat Kokrda und Mag.-R. Asperger im Namen der Stadt Wien. Herzliche Begrüßungsworte wurden gewechselt.« — »Man kam sich überall geborgen vor unter sicherer Führung der Wiener Polizeibeamten. Eine Tatsache, die nicht oft genug hervorgehoben werden kann« . . »In dem unvergleichlich schönen Prunksaale der Nationalbibliothek . . . Etwa 60 Ehrengäste aus den ersten Kreisen der Gesellschaft, Diplomatie, Politik, Regierung, Geistlichkeit, Handel, Industrie, Kunst und Wissenschaft . . . Bundespräsident Miklas und Kultusminister Dr. Czermak, von Reg.-Rat Steiner geführt, nahmen vor den Ehrengästen Platz, neben dem Bundespräsidenten saß unser ICK-Präsident John Merchant . . .« — »Die öffentlichen Empfänge bei Staatsoberhaupt und Stadt, besonders aber die Eröffnung des Esperanto-Museums, kann man vielleicht als die bisher bedeutendsten Veranstaltungen in unserer Bewegung überhaupt bezeichnen. Sie werden einmal in der Geschichte der Weltsprachenbewegung weitestgehende Würdigung finden müssen.« — Bedauern kann man nur, daß nicht alle Pioniere unserer Bewegung, die jahrzehntelang in vorderster Reihe unserer Front gestanden und noch immer stehen, Gelegenheit hatten, diese unvergesslich bleibenden Wiener Tage mitzuerleben.«

»**Pola Esperantisto**« — »Estis vere unika okazintaĵo por ni Esperantistoj, ke tiom grava persono, la Prezidanto de la Ŝtato bonvolis honorigi nin persone inaŭgurante la Muzeon. Vere granda kaj grava propagando . . . Prezidanto de la Aŭstria Respubliko s-ro Wilhelm Miklas kun ministroj kaj altranguloj ĉeestis la inaŭguron . . . Alparolis kaj salutis la Direktoro de la Nacia Biblioteko. Poste parolis, plej merita samideano, s-ro Hugo Steiner, kies laboroj kaj klopodoj por la Muzeo restos por ĉiam neforgeseblaj. . . . D-ro Sós (vere Unua E.-Unuiĝo laŭ propono de S. red) estis unu el la plej malavaraj donacintoj . . oferinte 700 librojn al Muzeo . . sekvis malavara donaco de altŝatata pioniro de Esp. s-ano Prok. Schade kaj multaj aliaj. Ĉiuj esp.-istoj devas de nun kompletigi la Muzeon laŭ siaj fortoj.« (O. Bujwid.)

Finota.

Intern. Esperanto-Muzeo en Wien.

Nova adreso: Wien, I. Augustinerstrasse 7 (tra la korto en la I. et.)

Ni ricevis nian oficejon en trakto de Nationalbibliothek kaj laboras tie de 1. de septembro. Ni tie volonte akceptos la samideanojn ĉiun mardon, ĵaŭdon kaj sabaton inter 9—13 h, sed plejofte ni ankaŭ estos tie la aliajn labortagojn je la sama tempo.

La granda ekspozicio de materialo el Int. E.-Muzeo en la pompa salonego de National-Bibliothek estas ĉiutage vizitata de multaj fremduloj neesperantistaj kaj per tio estas granda propagando por nia movado en aliaj landoj.

La 29. de sept. antaŭtagmeze de la 10.—12. h estos la ekspozicio malfermata por la legantoj de »Volkszeitung« kaj »Kleine Volkszeitung«, la 3. de oktobro ptgm. je la 3. h por la membroj de »Verein der städt. Angestellten«, la 4. de okt. atgm. por la lernejinspektoroj de Niederösterreich kaj la 6. de okt. de la 10.—12. h por la legantoj de »Kleines Volksblatt« kaj la samideanoj. Je tiu

tago ankaŭ venos la samideanoj el Bratislava al Wien.

La ekspozicion vizitis ĝis nun krom multaj aliaj personoj: la 18. de sept. la redaktoroj de la Wien-a gazetaro, la 19. la korespondantoj de la alilanda gazetaro, la 24. la lernejaj geinspektoroj de urbo Wien, la 25. kaj 26. reprezentantoj el komercaj rondoj.

Ni ankaŭ sendis detalojn pri la ekspozicio al 92 gazetoj en Aŭstrio ekster Wien kaj al pli ol 150 en la eksterlando. Certe ankaŭ granda propagando por E.

En la gazetlegejo de National-Bibliothek depost la 15. de sept. estas je dispono de la legantoj 86 E.-gazetoj. Ni klopodas kompletigi ĉi tiun liston.

Dum septembro kaj oktobro okazos por niaj samideanoj gvidadoj tra la ekspozicio je la supre nomitaj tagoj je la 11 h. La vizitontoj bonvolu atendi 5 min. antaŭ la 11 h ĉe la enirejo de National-Bibliothek sur Josefsplatz en Wien, I.

En la venonta numero ni publikigos la daŭrigon de la donacoj, kiuj nun venas en kontentiga amaso. Ni petas, ke vi havu iomete da pacienco kun ni! Por IEMW: Steiner, prez.

Rememoroj al la XXI-a en Budapest.

Estas al mi agrabla devo, diri iom pri la neniam forgeseblaj belaj impresoj, kiujn mi tie ĝuis dum mia sestaga restado. Oni min, kiel hungaranon, konsideros eble ne objektiva, se mi diras, ke la kongreso staris sub la devizo: »hungara gastamo«. Sed mi estas certa, ke ĉiuj aliaj partoprenintoj aprobos mian deklaron.

Sufiĉus kelkaj vortoj, por ĝenerale diri, ke la budapesta kongreso estis vere grandioza. Detaloj pri la diversaj aranĝoj ja aperis jam en raportoj, skribitaj de lertaj ĵurnalistoj en Heroldo de E. kaj Germ. Esp. Sed ankaŭ A. E. volas havi sian raporton. Do ni komencu.

Vendrede (2. VIII.) posttagmeze kaj vespere alvenis la kongresanoj en la kongresurbo, parte per trajno, parte surŝipe. La plej multo el ili iris al la interkonatiĝa vespero en la laktejo de l'bela urba arbareto, kie ĉe muziko regis vigla ĝoja vivo.

Sabate (3. VIII.) antaŭtagmeze kolektiĝis la samideanoj, irantaj aŭ veturantaj tra flagornamitaj stratoj en la akceptejon, por ricevi la kongresaĵojn, la belan kongresinsignon, kaj prizorgi siajn pasportaferojn kaj korespondaĵojn en tie ekzakte funkcianta poŝtoficejo. En la belega halo de Redutpalaco (Vigado), unu el la plej monumentaj konstruaĵoj de Budapest sur la kajo de Danubo, jam oni povis senti la amikan akcepton flanke de niaj hungaraj samideanoj. Kaj mi deziras esprimi mian miron pri tio, kiel ili povis fari, ke ili dum la tuta kongreso estis ĉiam kaj ĉie je dispono de tiom da fremdaj, scivolaj, petantaj kaj demandantaj personoj. Precipe kelkaj LKK-anoj iel mirakle multobliĝis, ĉar kie ajn oni iris, oni ilin renkontis servemaj.

Je la 11-a okazis la unua solenaĵo, t. e. la malfermo de Somera Universitato en la salono de Muzikakademio. Post orkestra ludo de l'hungara himno la ĉefprotektanto de S. U. eksministro, d-ro Georgo Lukács malfermis la kunsidon per elokventa parolado, akcentis la veran sencon de pacifismo, internaciismo kaj patriotismo. Ne ekzistas — li diris — inter ili antagonismo, ili sin eĉ reciproke kompletigas. Patriota sento ne povas esti barilo al la universala homamo kaj universala homamo ne povas detrui la patriotan senton. Paco povas nur deveni de l'harmonio de interncieco kun patriotismo.

Ni bezonas multajn kaj oftajn interrilatojn kun la eksterlando por transpreni fremdajn kulturojn kaj komuniki nian propran nacian kulturon al aliaj popoloj.

Por tia celo estas E. tre taŭga rimedo. (La parolado estis laŭte aklamata.)

Anstataŭante la forestantan prezid-anton, honoran rektoron prof. d-ron Kiss, transprenis poste d-ro Lorand la prezidon kaj prof. Canuto (Torino) prelegis pri »Historio de jura medicino«.

Posttagmeze je la 3-a estis kunsido de K. R. Mi ĉeestis kiel gasto, por aŭdi la decidojn pri la afero de l'Wien-a deficito. Inter aliaj punktoj de la tagordo prez. Schoofs sciigis ankaŭ pri doku-mento, per kiu dua landa organizo aŭstria »Aŭstria E.-Delegitaro« petas oficialigon. Al ĉi tiu temo mi petis la vorton kaj akcentis, ke la krizo en la aŭstria landa organizo esper-eble per reciproka interkom-preniĝo baldaŭ finiĝos, pro kio mi proponas prokrasti la decidon pri la afero ĝis sekvonta jaro. Kun ĝojo mi konstatas, ke ankaŭ la ĉeestanta repre-zentanto de AED. A. Klein akomod-iĝis al mia propono kaj la prokrasto estis akceptata.

La deficitafero, dank'al bonkoraj inter-venoj de s-anoj Merchant, Stettler kaj Blaise certe ankaŭ trovos kon-tentigan solvon.

Je 17 h vizitis pli ol 300 kongres-anoj la »Paneŭropo«-kunvenon, en kiu mi havis la honoron oficiale reprezenti »Paneŭropa-Unio«-n, prelegi artikolon de prez. Coudenhove-Kalergi kaj raporti pri E.-Sekcio de P. E. S-ano. Daŭge (Berlin) parolis pri E. kaj P.E. en Germanujo kaj Tauber (Bratislava) en la nomo de E.-Pacifista Ligo. Por la grandsukcesa aranĝo meritas la hun-garaj paneŭropanoj s-roj Kökény kaj Fried sinceran dankon.

Ke la kulminacia fazo de la unua tago estis la vespere okazinta solena malfermo de la kongreso, tion diri estas superflue. La luksa salonego de Vigado estis plenplena. Ĉeestis multaj altrangaj reprezentantoj, i. a. de la reĝa hungara registaro, urbo Budapest, diversaj ŝtataj legacioj, oficialaj kaj neoficialaj gravaj organizoj. Post malferma parolado de l'prez. de XX-a en Antwerpen Schoofs estis prof. Mihalik elektata prezidanto de XXI-a kaj salutis la kongreson. Poste nia laŭrata poeto Baghy deklamis jenan kortuŝan prologon:

La nova Bordo.

Post himnoflugo la orgen' silentas,
sed koraj kordoj vibras plu solene . . .
Pri vojkomenco rememor' legendas.
Espero pri l' estont' nin regas plene.
Post jara drivo por ripoz' rigardo:
jen nia ŝip' atingis novan bordon . . .
Okuloj brilas, flirtas la standardo,
kun Nova Sent' ni petas novan forton!

Ho Amo, vin ni vokas al la koro!
Nin superombru via bena graco
dum inspiritaj horoj de l' laboro,
dum la semad' de l' intergenta paco!
Sub sunkareso la semaĵo ĝermas . . .
Vi, nia sun', karesu koran humon!
La varmon ni en ni dankplene fermas
por havi fruktojn: Belon, Bonon, Lumon!

Post halt' momenta kaj labor' finita
ekiru nia ŝip' al nova bordo . . .
Tra ondoj, super rifoj saĝo spita
direktu ĝin al certa bona sorto!
Okuloj brilu, flirtu la standardo,
favora vento ŝvelu ĝian velon,
admonu nin konstante kora ardo:
Gefratoj, ni atingos nian celon!

Sekvis laŭorde la regulaj salutparoloj de oficialaj kaj naciaj reprezentantoj kaj fine de nia ŝatata ICK-prez. Merchant »Multaj venis« — li diris — »el mal-proksimaj landoj, por invadi Budapeston, sed ni venis ne kun armiloj, nur kun amo en la koro«. En sia ĉiam sprite bonhumora parolado M. aludis al tio, ke li naskiĝis en la sama jaro kaj sub la sama stelo, kiel Budapest (nome kiam la du urboj Buda kaj Pest unuiĝis al unu grandurbo).

Dimanĉe (4. VIII.) post katolika kaj protestanta diservoj sekvis je la 11-a la solena inaŭguro de la belega nova standardo de H.E.S. en Muzikakademio, kiuokaze s-ino Isbrücker diris la fest-paroladon. aludante al tio, ke nia stand-ardo, kiun ni amu kiel nian simbolon, ne vokas al batalo, sed al paco.

Kondukate de la flirtanta standardo kaj de orkestro ludanta fajrajn hungarajn marŝojn, la kongresanoj marŝis en longa kolona vico, kaj salutata de l'surstrate amase staranta publiko, ree al »Vigado«, kie estis malkovrata granda bela marmor-tabulo je honormemoro al grafo Stefano Széchenyi (la »plej granda hungaro«), kiu jam en 1842-a en la Hungara Scienca Akademio, kies fondinto li estis, pledis por internacia lingvo. Ke super la nomo de grafo Széchenyi brilos de nun daŭre nia verda stelo, pri tio ne nur niaj hungaraj s-anoj, sed ankaŭ la tutmonda esperantistaro devas esti fieraj.

Vespere balo en Reduto. Mi sidis sur la estrado, por ripozigi miajn lacajn, ne plu dancemajn piedojn, kaj ĝuis la pentrindan bildon de variaj kostumoj kaj de grupoj, prezentantaj naciajn dancojn. La vigla amuza festo ĉe verva cigan-muziko finiĝis longe post noktomezo. Dum la balo estis ankaŭ elektata »Miss Esperanto«. En Wien dum Antaŭkon-greso sidis en Annagasse grupo de ĉarmaj gejunulinoj el Estonio. Inter ili ĉarma blondulino, modesta kaj silenta. Post la budapesta elekto mi rekonis en »Miss Esperanto« nian ĉarmulinon, f-inon Eksta.

La ekskurson al Visegrád mi ne parto-prenis, por povi viziti parencojn kaj malnovajn amikojn, inter aliaj ankaŭ mian ankoraŭ vivantan 90 jaran gimnazian profesoron, kiun mi post 46 jaroj revidis. Sed mi aŭdis pri bonega sukeeso de la ekskurso, post kiu la s-anoj refresiĝis en la ondoj de la fama Gellért-baneja baseno.

Inter aliaj solenaj kaj tamen amuzaj aranĝoj estas menciindaj la koncerto de blindaj virtuozoj, disaŭdigita ankaŭ per Radio, Hungara Artvespero, la teatra prezentado bonege aranĝita de Baghy, la ĝardenfesto sur Margaret-Insulo aran-ĝita de la Hung. Virina Asocio »Pro Patria«, kies prezidantino s-ino Réthey perfekta E.-parolado salutis la gast-ojn, kaj kie, krom aliaj artaj prezentadoj, distingaj gejunuloj prezentis historiajn kaj naciajn dancojn en luksaj nobelulaj hungaraj kostumoj. Samvespere en la laktejo de la insulo ni ĝuis koncerton de la altranga simfonia orkestro. Urbo Budepest invitis prksm. 120 eminentulojn al teo en la luksa Gellert-hotelo, kie ni en la nomo de la urbestro estis salutataj hungare de urba konsilanto Purebl. Prez. Merchant danke res-pondis kaj diris i. a. la jenon: »El via hungara parolado sinjoro konsilanto mi komprenis nur du vortojn: Esperanto kaj kongreso. La forigo de lingvaj malfacitaĵoj alogus pli kaj pli da fremd-landaj vizitantoj en vian belegan urbon. La enkonduko de E. en viajn lernejojn tre helpus tion.« Sed ankaŭ invitoj en la ŝtatan vinkelon Budafok, en iun bier-farejon, en la hejmon de hungaraj ĵurnalistoj »Otthon« ktp. ktp. evidentigis la gastamon de la budapestanoj. Ke multaj kongresanoj ne preterlasis pasigi vesperon en kafejoj, kie fama cigan-muziko ludis, tion povas ĉiu imagi, kiu konas la noktan vivon de la pulsanta hungara ĉefurbo.

Ho ĉesu, ho ĉesu — mi mortas pro envio! mi jam aŭdas voki la legantojn de ĉi tiu raporto, kiuj ne povis viziti la belan kongreson. Ĉu vi ĉiam nur amuzis?

Ho, ne! Ĉar en bone vizitataj labor-kunsidoj kaj en prelegoj de Somera Universitato same, kiel en fakkunvenoj estis pridiskutataj multaj gravaj temoj, pri kiuj detale raporti en la kadro de al mi disponigita spaco ne estas eble. La ferman kunsidon mi ne plu ĉeestis pro pli frua forvojaĝo, antaŭ kiu mi nur premis la manon de l' kongrespre-zidanto, prof. Mihalik, petante lin kon-sideri tion kiel elkoran saluton kaj dankon al ĉiuj LKK-anoj kaj kiel es-primon de mia entuziasmo pri la gran-dioza festo.

Karaj amikoj en Hungarujo, akceptu

ĉi tie refoje sinceran dankon kaj laŭdegon pri via ne priskribeble grandaj meritoj!! Alportu, via laboro bonajn fruktojn!

Migrado al la tombo de Giesswein.

Ne tre multaj, sed tiom pli fidelaj amikoj de l' mortinto, ni veturis lunde, la 5. VII., atgm. al la tombo de nia neforgesebla pioniro papa prelato d-ro Aleksandro Gieszwein, kie prof. Bujwid, Ludoviko Kiglits, d-ro Lorand, pastro Rodando kaj mi honoris per kortusaj vortoj la memoron de l' fama scienculo, pacamiko kaj samideano, kiun ĉiuj lin konantoj altestimis kaj amis. Post ornamo de la tombo per floroj finiĝis la funebra sceno.

Ĉu mi diru ankaŭ ion pri la beleco de Budapest? Ne, ne. Vortoj ne sufiĉas. Iru mem, kaj ĝuu la ĉarmon de »Regino de Danubo«!

La kongresanaro estis de sia eminenta pioniro prez. de ICK. Merchant vere distinge gvidata. Prez. M. ĉeestis ĉiujn gravajn aranĝojn, prezidis la laborkunsidojn, parolis ĉiuokaze elokvente kaj kun varma bonhumoro en sia kaj en la nomo de la samideanaro, interesiĝis pri ĉiu kaj ĉio kaj meritas sinceran dankon por sia nobla reprezentado.

Estus maljuste ne mencii ankaŭ la senlacan, seriozan laboradon de ĝen. sekr. de ICK Robert Kreuz, kies meritojn la prezidanto de ICK (kiel mi poste legis) en la ferma kunsido laŭinde akcentis.

Ĉiuj ĵurnaloj kaj ilustritaj revuoj raportis en longaj artikoloj kaj reproduktis bildojn el la kongreso. La ĵurnalo »Magyarság« aperigis ĉiutage tutan paĝon en Esperanto.

D-ro Edmund Sós.

XIV. Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Protektanto: Lia episkopa moŝto Monsignoro d-ro Joh. N. Sedlák, Prag.

Sub gvidado de sia favorega prezidanto prof. J. Font-Giralt el Hispanujo la delegitoj de IKUE, reprezentante 18 naciojn, okazigis sian ĉijaran mondkongreson en Praha (11.–15. aŭg.)

Post solena meso, legita de kanonika moŝto doktoro Eltschkner ĉe Ursulinoj, okazis en la kunsidsalonego de l' senatejo la malfermo de la kongreso. La prezidanto lia kanonika moŝto d-ro Anton Eltschkner, prezidanto de Ligo de Kat. Esp.-istoj en ĈSR. kaj de Loka Komitato, elkore salutis kaj sekvigis impresigan paroladon en E. esprimante sia ĝojon, ke la temo pritraktota en la kongreso »La katolikaj misioj« estas nepre laŭtempa kaj salutinda, ĉar la katolikaj esp.-istoj, kunvenintaj en Praha tiel muitnombre el multaj landoj, estis elektintaj kiel sian patronon Sanktan Venceslaon, mem idealo de la misianoj kaj apostolo de la kredo.

Poste prezidanto de IKUE profesoro Font-Giralt ekprezidis kaj esprimis sian profundan dankon al la Loka Komitato pro la preparaj laboroj.

Sekvis salutvortoj al la kongreso flanke de la delegitoj kaj la eklezaj kaj ne-eklezaj estraroj.

En tri laborkunsidoj en ĉeesto kaj per vigla kunlaboro de la kongresanoj la kongrestemo »La katolikaj misioj« detale estis pritraktata kaj oni decidis, presigi la alvenintajn valorajn misiraportojn kaj sukcesojn kaj alsendi al ĉiuj interesemuloj.

Krome oni faris gravajn decidojn pri plibonigo kaj pligrandigo de »Espero Katolika«, la revuo de IKUE. La meritplena ĝenerala sekretario P. A. Schendeler (Nederlando) estis reelektata je 4 pluaj jaroj.

Kun eksterordinara granda aplaŭdo oni akceptis kiel venontjaran kongresurbon la proponon koncerne Graz.

La estraro de Loka Komitato ĉion faris al la delegitoj kaj gastoj por agrabligi kiel eble plej multe la restadon en Praha. Speciale estu menciata la solena akcepto en Urbdomo flanke de l' urbestro d-ro Baxa en ĉeesto de kelkaj senatanoj. Post la akcepto la urbestro regaligis la kongresanojn ĉe festeno grandstila.

En la tempo inter la laborkunsidoj per granda komplezo de la ekleziaj kaj neekleziaj estraroj la kongresanoj povis vidi ĉiujn belaĵojn de la centtura Praha, riĉa je antikva tradicia kulturo.

Al ĉiuj amikoj en Praha unuavice al prez. d-ro Eltschkner, f-ino Dandova, s-roj Kudrna, Kozel kaj Buhr pet tio estu esprimata plejkora danko.

Leopold Chiba, sekretario de l' kongreso.

IX. SAT-Kongreso.

En Leipzig de 4.—10. de aŭgusto okazis Naŭa SAT-Kongreso. Estis anoncitaj 1102 gek-doj, el kiuj venis 662 el 22 landoj, la pleigrandparto el Germanlando. Ili ĉiuj senpage loĝis ĉe la laboristaro en Leipzig, signo de forta konscio de solidareco! En 5 laborkunsidoj kaj 22 fakkunsidoj estis pritraktata la granda programo de la kongreso.

La raportojn prezentitajn de Plenum-Komitato sekvis akraj atakoj kontraŭ la gvidantaro de SAT kaj precipe kontraŭ k-do Lanti, kiu forte defendis sian agadon. Fine solviĝis la konflikto, jam minacanta detrui la unuecon de SAT, per formulo restariganta la pacon. Estis akceptata finrezolucio, en kiu la Kongreso esprimas sian fidon al ĉiuj gvidantaj organoj. (Laŭ Sennaciulo.)

Gvidlibro »Wien«

ilustr., bona preso sur bela papero Ŝ 1.50 afr. Por grupoj Ŝ 1.20.

Mendu de nia gazeto.

UEA ŝanĝis sian adreson. Ĉiujn leterojndirektu al UEA, Tour-de-l' Ile 1, Genève.

Ekzameno de instruistoj pri E. en Svedujo.

La praktika metodo Ĉe multe interesigis la svedan instruistaron pri E., speciale en la rondoj de Laborista Kleriga Asocio. Oni invitis nian konatan s-anon Morariu el Rumanujo, por instrui laŭ metodo Ĉe. En du dektagaj kursoj po 25 instruistoj el la tuta lando estis instruataj kaj sub la prezido de rektoro Jansson, prezidanto de Sveda E.-Federacio kaj de Sveda E.-Instituto, kaj de la kiel gasto ĉeestinta prof. Otto Simon el Wien, membro de Ŝtata Ekzamen-Kommisiono por E., okazis la ekzamenoj, kiuj bonege sukcesis.

Aparta aŭtomobilo en la servo de E.

Al Brita E.-Asocio la membraro donacis aŭtomobilon, kiu propagandcele havas sur unu flanko reklamon por Esperanto, sur la alia por »International Language«. Ni deziras, ke aliaj landaj organizoj havu ankaŭ la monrimedojn sekvi la bonegan ekzemplon.

Sinceran gratulon al
d-ro Kolomano Kalocsay kaj edzino
okaze de ilia geedziĝo.

Int. E.-Muzeo en Wien.

Ni elkore gratulas al nia kunlaboranto pastra moŝto J. Ŝirjaev en Baklanka, USSR, kaj lia edzino okaze de la 25-jara datreveno de ilia geedziĝo.

Prof. L. Kronenberg-Warszawa mortis la 7. sept. multaj s-anoj donis al la meritplena samideano la lastan honoron. Ĉe la tombo parolis f-ino Lidja Zamenhof kaj s-ro Wiesenfeld.

Miss Esperanto.

Dum la XXI. estis el ktataj f-ino Veronika Eksta (Estonio) »Miss Esperanto« kaj f-inoj Vicenta Garcia Aguirre (Hisp nujo), Nelli Penciova (Bulgarujo), Weiszkopf Klari (Hungarujo) kaj Toby Barbock (Skotujo) ŝiaj» korteganinoj.»

Elkoran dankon mi deziras esprimi al ĉiuj, kiuj afable gratulis al mi okaze de mia honorigo. Pli ol 600 samideanoj faris tion dum neforgesebla Antaŭkongreso, multaj ankaŭ letere (Germana E.-Asocio, Heroldo de Esperanto, E.-Asocio de Stirio-Graz, E.-grupo Peltiier-Graz, E.-grupoj Baden kaj Krems, E.-grupoj Fideleco, Virina sekcio kaj multaj s-anoj. Al ĉiuj vere sinceran dankon!

Reg. kons. Steiner.

Gravaĵoj.

Oficiala Dokumentaro Esperantista.

Int. Centra Komitato de la E.-Movado en Ĝenevo kiel ĉiujare ankaŭ por la Dudeka Universala Kongreso de Esperanto (Antwerpen, 3.—11. aŭgusto 1928) eldonis sur 139 paĝoj la Oficialan Protokolon, Financan Raporton kaj Statistikojn, Raportaron de la oficialaj institucioj al la XX.-a kaj Aldonon pri 4-a Somera Universitato en Esperanto.

Tre interesa, leginda por la ĉeestintoj kaj nepartoprenintoj! La preso de Belga Esp.-Instituto estas tre bela. La prezo bedaŭrinde ne indikata.

Internacia Kongreso pri Reklamo okazis en Berlin 11.—17. aŭgusto. Lau invito de urbo Dresden parto de la kongresanoj venis por vidi la belaĵojn de Dresden. La toaston dum tagmanĝo kaj la salutvortojn de l' urbestro d-ro Bührer anglen tradukis eksmajoro Schäffer kaj en Esp. konsulo d-ro Heinrich Arnhold. La lasta traduko speciale interesis la kunvenintojn.

Landa Ligo de Hungaraj Instruistaj Asocioj. En la gvidantar-kunsi o la 4. julio prof. Jozefo Mihalik, v cprez. de HES, faris prelegon pri la pedagogia valoro de E. La ligo decidis akcepti la instruadon de E. en sian laborprogramon. Grava sukceso!

En la **edukejo por pastroj en Wien** — kiel informas ties direktoro kanonika moŝto Handloss — laŭ deziro de Lia kardinala moŝto d-ro Piffl estos de oktobro nj. enkondukata E.-instruado en la internulejon. (Laŭ raporto de d-ro Walka dum XIV. en Praha).

Religiaj (kristanaj) socialistoj-esperantistoj skribu al mi vian precizan adreson, por ke ni komune agadu kaj servu la internacian religian (kristan-) socialistan movadon. Ni uzu la utilon de E. kiel interfratigilon kaj interkomunikilon por nia movado. J. L. Bruijn, Daguerrestraat 156, Haag.

VII. Mondkongreso de Int. Vegetara Unio (7.—11. 7. 1929) en Steinschönau, Ĉ. S. R. disdonis sian bilancon nur en E. La paroladoj estis en germana, angla kaj E.-lingvoj. La venonta kongreso okazos en 3 jaroj en Germanujo.

Centra Komitato de Lenina Junul-Komunista Asocio Ukraina (CK LKSMU) akceptis rezolucion, per kiu ĝi rekomendas al aborista junularo lerni E.-on kaj konsideras necesa, ke junul-komunistoj plej aktive partoprenu en E.-movado. (Laŭ Bulteno de SEU).

Sindikato de klerig-laboruloj de USSR komencis eldoni E.-lingvan gazeton »Soveta Pedagogia Revuo«.

Tutrusia SEU-Komitato informas, ke Tutrusia SEU-kongreso nunjare ne okazos kaj ke la nova adreso estas: Moskva-34, Poĉtovij jaŝĉik n-ro 30, Vserossijskij komitet SESR.

Radio-sendstacio Turin disaŭdigis la 21. aŭg. je 21.30 h dum 10 min. en E. kaj daŭrigos la dis ŭdigon ĉiun merkredon j la sama tempo. Pri bona ricevo bonvolu raporti al la direkcio de EIAR Radio-Torino. Ni esperu, ke aliaj italaj sendstacioj sekvu la bonan ekzemplon de Torino.

Radio Odessa intencas disaŭdigi E.-koncertojn, -raportojn, -kursojn ktp. Aŭstria E.-Asocio kaj nia gazeto elkore salutas ĉi tiun decidon kaj gratulas al Radiomovni vuzol, Lenina 17. Odessa, USSR, al kiu adreso povas ankaŭ esti sendataj bondeziroj flanke de la samideanaro.

Estona Turista Klubo en Tallinn decidis uzi por siaj aferoj kun eksterlando nur Esperanton, dungi venontsomere E.-parolantan oficiston kaj rekomendi al ĉiuj membroj, agentoj kaj gvidantoj lerni E.-on. (Laŭ rap. Henr. Seppik en »Heroldo«)

Nova gazeto! Litova Esperanto-Revuo naskiĝis en julio nj. Ni deziras pere de ĝi plivigligon de la movado en Litovujo. Provnumeron de Edv. Mediŝanskas, Kaunas, Darbininky 16

Instrua libro pri katolika kateĥismo en E. estas jam verkita kaj prespreta, mankas nur la mono por la eldonado.

Mondvojaĝanto AdalbertSmit-Hago bonege raportas en Heroldo de Esperanto n-ro 33 pri sia vojaĝo tra Hispanujo kaj Francujo nur pere de Esperanto.

Gvidfolio pri Haiger en E.-Iniciinto s-ro Brandt, Haiger.

Prospekto pri Kassel en E., eld. de Porfremdul-Unuiĝo Kassel sekve de klopodoj de s-ro Dreusicke-, Kassel.

La del. kaj vicdel. de UEA en Aalst, Denderstraat 58, Belgujo, eldonis karton kun bildo de nia majstro, desegnita laŭ kubista koncepto. 10 ekz. kostas 1 sv. fr. ĉe la eldonintoj.

Aŭstria Esperanto-Asocio
I. Augustinerstraße 7

Prüfungen für das Lehramt und den Nachweis der Kenntnis des Esperanto.

Die Herbstprüfungen beginnen am 4. November um 8 Uhr früh, Bundeslehrerinnenbildungsanstalt, Wien, I. Hegelgasse 14. Die laut Prüfungsvorschrift belegten und gestempelten Gesuche um Zulassung sind bis spätestens 19. Oktober 1929 bei der Direktion der Prüfungskommission in Wien, I. Burgring 9 (Stadtschulrat), Zimmer 53 einzubringen. Die Prüfungsgebühr (20 S für die Lehramts-, 10 für die Kenntnisprüfung) ist vor Beginn der Prüfung im Prüfungsraume zu erlegen. Prüfungsvorschrift vom Bundesverlage, Wien, I. Schwarzenbergstraße 5 beziehbar.

En »Volkshochschule«, Wien, 16. Ludo Hartmannplatz 7 ĉiujn mardon kaj vendredon 6—7 h kurso por komencantoj. Sinanonco ankoraŭ ebla! (Gvid. W. Smital).

Kat. E.-Unuiĝo en Wien. Kursoj komenciĝos meze de oktobro. Informojn pri komenco ktp. en la centrejo I. Freyung 6

Policaj E.-kursoj komenciĝis en la lernejtaĉmento, Wien, 3. Marokkanerg. 4, nome ĉiun lundon, mardon kaj merkredon por komencantoj $^1/_2$7—$^1/_4$8 kaj por progresintoj $^1/_4$8—8 h. Policistoj el la distriktoj bonvenaj! (Instr. Reg. kons. Steiner).

Kunveno en Hainburg.

Samideanoj el Bratislava venis la 15. de sept. al Hainburg kaj agrable pasigis la tempon kun aŭstriaj samideanoj.

Edziĝis

s-ro Willy Matzke kun f-ino Grete Nittmann el Pögstall kaj **f-ino Gisela Gschmeidlinger** kun barono Walter Stockart von Bernkopf el Braunau.

Koran gratulon!

Rimarkindaj presaĵoj.

Casari-Scheibenreiter, Esperanto-Lehr- und Lesebuch für österr. Hauptschulen und für die unteren Klassen der Mittelschulen.

II. Teil. Oberstufe. Verlag Hirt u. Sohn, 1929. Alleinauslieferung durch R. Foltanek Wien, I. Herreng. 2—4. 96 Seiten Preis S 3.50.

Das Buch ist inhaltlich und methodisch die gerade Fortsetzung des 1. Teiles. Bildeten dort die Erlebnisse zweier Kleinstadtkinder in Haus und Schule, auf dem Lande und in Wien, die stoffliche Grundlage des Lehrganges für den Anfangsunterricht, so bildet hier den Hauptteil des Lesestoffes (41 Textseiten) die außerordentlich lebendige, erlebnisreiche Schilderung einer Reise durch Österreich, die Jung-Erich mit seinem Vater in den Ferien unternimmt. Sie führt nach Wien, über den Semmering nach Graz—Klagenfurt, mit der Tauernbahn nach Innsbruck, dann über München nach Salzburg—Linz und auf der Donau wieder nach Wien. Berichte von Mitreisenden, Freunden und Bekannten insbesondere über Vorarlberg und das Burgenland ergänzen die Schilderungen. In geschickter humorvoller Darstellung werden Erzählungen und Gespräche der Reisegenossen, Sagen, Anekdoten, Briefe, Erlebnisse (wie z. B. der Besuch einer Esperantistenversammlung) eingestreut. Die Schüler der 4. Klassen, die diesen Teil als Lehr- und Lesebuch benützen, ergänzen und vertiefen daher in den Esperantostunden gleichzeitig ihre Kenntnisse in Vaterlandskunde, die in diesen Klassen im Mittelpunkte des erdkundlichen Unterrichtes steht — ein gutes Beispiel stofflicher Konzentration zwischen Esp. u. Erkunde. — Ähnliches gilt von dem allerdings kürzeren länder- und völkerkundlichen Abschnitte El la vasta mondo. Weiter werden die Schüler mit Zamenhof, den E.-Tagungen und den Organisationen des E. bekannt gemacht, Gedichte, Lieder, Rätsel aller Art u. lustige Erzählungen führen in verschiedene Lebensgebiete und vermitteln vielseitigen Wortschatz. Ein kurzer, aber vollständig genügender »Abriß der E. Gramatik« (11 S.) schließt das schön ausgestattete Buch, das mit vielen Bildern, darunter 23 prächtigen Landschafts- u. Städtebildern aus Österreich u. einem Bilde Zamenhofs geschmückt ist.

Ein mit viel Fleiß und Geschick und mit ebenso viel Liebe und Verständnis für den schulmäßigen E. Unterricht gearbeitetes Buch, das nunmehr, da E. in Österreich als Freigegenstand an Haupt- und Mittelschulen zugelassen ist, diesen Unterricht in jeder Hinsicht zu fördern berufen sein wird.

Dr. Fr. Wollmann

Kie oni renkontas E.-istojn?

Graz.

Esp.-Verein für Steiermark, Geschäfisstelle (oficejo) Schönaugasse 6/II, Vereinsheim (kunv.) »Pastete«, Sporg. 28, Do (ĵ) 20—23 h.

Leoben.

Esp.-Verein für Steiermark: Cafe Weidbacher, Mittwoch (me) 20—22 h.

Innsbruck.

Esperanto-Klub, Gasthof »Grüner Baum«, Museumstraße. Mi (me) 20—22 h.



Wien.

Katolika Unuiĝo E.-ista en Wien, I. Schottenho (Akademikerheim) Mi (me) 18·00—20·00 h.

Esp.-Unuiĝo-Wien, I., Annagasse 5, I-a et., klubejoj de »Politische Gesellschaft«, Fr. (v.) 19·30 h.

Aŭstria Pacifista Esp.-Societo, IV., Schäffergasse 3, Mi (me) de 19 h.

Esp.-Verein der städt. Angestellten Wiens, IV., Schäffergasse 3, ĉiutage 17—19 h.

Viena Akademia Unuiĝo Esp., VII., Neubaugasse 25, Cafe Elsahof, Mo (l) 19—23 h.

Esp.-societo »Fideleco«, Währinger Bürgercafe, XVIII., Staudgasse 1, Di (m) 16—19 h.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg 248. – Presejo: Franz Reifmüller, Wien, I, Johannesgasse 6